

Memoraĵoj de jakarando

(Verkita de Biel Mesquida, tradukita kaj surbendigita de Nicolau Dols)

Mia naskiĝo estas mita. Mi povus esti la filino de unu brazila imperiestro forpelita el sia trono je la deknaŭa jarcento aŭ de francaj kamparanoj elvenintaj el Brazilo. Sed mi estas tiom maljuna ke nur revenas al mi nubaj memoraĵoj pri botanika ĝardeno en franca kastelo, kun fratinoj kiuj akompanis min al fojroj en tuta Eŭropo. S-ro Orlandis Desmar i Aiguaflor estis majorka nobelo, nepo kaj pranepo de termastroj, kiu estis absoluta floramema. Du plantoj frenezigis lin: rozoj kaj jakarandoj.

Tial dum vojaĝo kiun li faris al Lyon, li estis promenanta tra la semejoj kaj la arbusta kaj arba ekspozicio kiam li ekvidis min, rigardis al mi kaj rerigardis, tuŝis min kaj subite enamiĝis al mi. Kiel mi eksciis tion? Mi povus klopodi konservi la kronologion aŭ grimpi tra la branĉoj kiel koheras kun la penso de arba specio. Ĉar kiam mi estis jam enplantita meze de la parko de Son Pensenidormen, S-ro Orlandis promenis unun tagmezon kun maljuna ĝardenisto, Pere Antoni Xorric, kaj diris al li: Pere Antoni, mi volas ke ĉi tiu jakarando bonege kreskas ĉar mi scias ke post iom da tempo ĝi grandiĝos kaj kreskigos larĝan branĉaron kun multe da tiuj nuboj de floroj bluj kaj violkoloraj, kaj plezurigos miajn okulojn kaj mian korpon.

Tiu saĝa ĝardenisto konis la emon de sia sinjoro je la Brazila jakarando, tiu *Dalbergia nigra* kiu alklimatiĝis sen peno, tiu *Dalbergia nigra*, mi mem, kiu jam estis junulino. La konfidon inter mastro kaj ĝardenisto mi eklernis tiu tago. Ili revenas nun. Ili jam antaŭe venis por ĝeni min per maŝinoj, fosiloj kaj etaj tankoj kiuj ĉion fuŝas. Mi ne scias kion oni planas, sed mi sentas per ĉiuj floroj de ĉi tiu printempo kiel eta timo eniras la preskaŭ violkolorajn bluojn de mia petalaro. Denove. S-ro Orlandis enamiĝis ankaŭ al unu servistestrino, Apol·lônia Servera Busquets. Mi scias ĉi tion ĉar unu tago posttagmeze, kiam mia violkolora florado aŭdiĝis tiel kiel ŝik-ŝik, la paro alvenis. Li faris por ŝi kusenon per la silka koltuko ĵus de ŝi donacita al ŝi. Kaj ili sidiĝis apud mia trunko. Ĉi tie li demandis al ŝi ĉu ŝi volis edziniĝi kun li. Petalaro plu ol kutime faliĝis el mi pro la emocia tremo de la sceno.

Ili jam revenas. Ili similas diablidoj. Ĉiuj armiĝitaj. Ĉiuj maŝiniĝitaj. Kion mi estis diranta? S-ro Orlandis kaj S-rino Apol·lônia geedziĝis kun la protestoj de lia familio kaj la ĝojo de ŝia familio. Tri gefiloj naskiĝis: Felip, Joan Lluís kaj Isabel, kiuj kreskis kun sano kaj riĉo. Post sia patro mortiĝis, malgraŭ la malutila malkonsento de sia patrino, ili vendis la marbordan terpecon, tiam renomigita kiel *Las Villas de Acapulco*. Mi, laŭ la kapriĉo de S-rino Apol·lônia, staris meze de ĝardeno dediĉita al ŝia edzo. Min ĉirkaŭas dekduo da cercisoj kiujn ŝi mendis enplanti okaze de la dediĉado. S-rino Apol·lônia mortiĝis antaŭ du semajnoj kaj ĉar Son Pensenidormen devas esti dividita inter la tri gefratoj, ili decidis igi ĝin ĉarma luksa hotelo. Mi vidas la alvenantan buldozon. Ĉi tiu ulo serĉas min. Mi certas pri ĉi tio. Li alvenas ĝis mia trunko. Li prenas gigantan segilon kaj ekŝiras min. Mi ne povos vidi nek la milojn da violokoloraj floroj kiel konfetoj kovrontaj la buldozon kaj ĝian stiriston, nek kiel ili lin sufokos per beleco.